

Heinrich Heine,
 [Ne scias mi, kio okazis]
tradukita de Paul Gottfried Christaller

El la "Libro de la kantoj", parto "La Reveno".

Ne scias mi, kio okazis
 al mia tristema kor':
 Antikva legendo min kaptis,
 ne cedas el mia memor'.

La Rejno fluadas trankvile
 murmuras kiel mister',
 la supron ŝonegan orumas
 sunbriloj de la vesper'.

Plej bela virgino jen sidas
 mirinda sur la montet'
 kaj ŝia oraĵo radias,⁴
 ŝi logas kiel magnet'.

Ŝi kombas la oran hararon
 abundan per ora kombil',
 kantante misteran lidon,⁵
 ravantan kiel sunbril'.

...

Heinrich Heine,
 Lorelej
tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Ne scias mi, kial subita
 malgaj' en la koro naskiĝis;
 el tempo jam enterigita
 legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,
 la Rejno mallaŭte babilas,
 per oro de l'sun' en vespero
 la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:
 en ora ornamo brilante,
 sur supro de l' monto ŝi sidas,
 la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas
 kaj kantas tra l' pura aero,
 kaj forto mirinda sin trovas
 en tiu ĉi kant' de l'vespero.

...

Heinrich Heine,
 Die Lorelei

Ich weiß nicht, was soll es bedeuten,
 daß ich so traurig bin;
 ein Märchen aus alten Zeiten,
 das kommt mir nicht aus dem Sinn.

Die Luft ist kühl und es dunkelt,
 und ruhig fließt der Rhein;
 der Gipfel des Berges funkelt
 im Abendsonnenschein.

Die schönste Jungfrau sitzt
 dort oben wunderbar,
 ihr goldnes Geschmeide blitzet,
 sie kämmt ihr goldenes Haar.

Sie kämmt es mit goldenem Kamme,
 und singt ein Lied dabei;
 das hat eine wundersame,
 gewaltige Melodei.

...

⁴En la sube menciiita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia". Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

⁵En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

Ŝipisto en sia ŝipeto
kaptiĝas per stranga dolor',
la rifon li tute ignoras.
atentas nur ŝin kun fervor'.

Mi kredas: la ondojenglutas⁶
ŝipiston, ŝipeton je l' fin',
kaj kulta pri tio nur estas
kantado de la virin'.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de
HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en
Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER
(*1860-08-21 – †1950-12-31).

Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el
la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita
en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Insti-
tuto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldo-
no. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsu-
pre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Fried-
richswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblio-
teko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung
von Heinrich Heine siehe: "Buch der Lieder", Ab-
scbnitt "Die Heimkehr". - Informoj pri la tra-
dukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedia
retejo http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller, kun foto de li.

Ŝipet' iras sur la rivero,
ŝipisto ektremis de l' kanto,
kaj blinda por ĉiu dangero
rigardas li al la kantanto.

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela
perdiĝis sub l' akvoturnado;
ĉin Lorelej' faris kruela,
per sia mirinda kantado.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de
HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17)
en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMEN-
HOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 –
†1917-04-14).

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo
<http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

Den Schiffer im kleinen Schiffe
ergreift es mit wildem Weh;
er schaut nicht die Felsenriffe,
er schaut nur hinauf in die Höh.

Ich glaube, die Wellen verschlingen
am Ende Schiffer und Kahn;
und das hat mit ihrem Singen
die Lorelei getan.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 – †1856-02-17), publikigita 1823.

Arg-2-2 (2014-04-23 18:09:02)

Aus dem Werk "Buch der Lieder", Kapitel "Die Heimkehr",
Abschnitt II. Siehe auch ein <http://gutenberg.spiegel.de/>?id=5&xd=1131&kapitel=12&cHash=eb14eca2272#gb_found. Vidu
ankaŭ: http://www.gedichte.vu/?die_lorelei.html.
La melodion verkis la komponisto Friedrich Silcher. Vi-
du la retejon http://www.lieder-archiv.de/die_lorelei-notenblatt_300493.html.

⁶Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.